

Enkonduke al la 29-a numero

La naturo transpaŝis la someran solsticon kaj por la homoj sur la norda hemisfero komenciĝis la tempo de ferioj, labora ritmo mildiĝis ĝuste pro la emo ripozi, turisme vojaĝi, cetere, la altiĝanta temperaturo ne subtenas laboran streĉon... La situacio en Konstru-Forumo tion atestas, en tiu ĉi numero ne estas plua serio de diskutotaj terminoj el EBV Duden. Novan temon mi envicigis nur unu (tektoniko). Reagoj al la temoj ĝisnunaj raras... tamen pluraj el vi intense laboras.

La kolego **Đorđe Obradović** por si renovigas familian domon en Nova Crnja, kiu ne situas en lia hejmlando Slovenio, sed en la najbara Vojvodino-Serbio. El lia mesaĝo mi citas: „Kvankam mi klopodis fari seriozan respondon al la 28-a Ko-Fo, mi ne sukcesis, la kialo estas mia okupiteco pro la renovigo de domo, kiun mi kun mia edzino aĉetis... Temas pri la domo farita el premita tero, kiun mi prezentis en mia artikolo por la *Jarkolekto de TAKE 2011*. Ĉiutage mi devas sekvi metiistojn, kiuj laboras ĉe renovigo de la domo konstruita en la jaro 1905. Ĝis la fino de ĉefaj laboroj mi havos ankoraŭ 2-3 streĉajn monatojn. Mi pardonpetas kaj kore salutas vin el Nova Crnja.“

Fabien van Mook estas plu tre okupata per la esplora tasko priskribita en la *Jarkolekto de TAKE 2010*: Fazoŝanĝaj materialoj en la mantelo de ĉambroj. Tamen li parte komentis KF 28.

Pierre Grollemund nun (eble) iom ripozas, sed en la ĝuste pasintaj monatoj li vizitis sian filinon en la sudamerika Ĉilio, kie li helpis ĉe la riparo de tegmento sur la domo de lia bofrato. Laŭ lia mesaĝo el la 1-a de marto 2011 mi citas: „...granda varmo, ĉar ĉi tie estas somero; pasis unu jaro post la terura tertemego en la pasinta jaro (la 27an de februaro 2010), memor-manifestoj, sed ankaŭ protestadoj kontraŭ tro malrapida rekonstruado!... Ni helpas la familion, mi riparos fendegojn en la muro de la domo de la bofrato kaj helpis renovigi tegmenton kovrotan per „*tejas asfálticas*“ (ĉu asfaltaj ŝindoj?). Tiel mi lernis multajn teknikajn nomojn en la hispana (ekz. *lima hoyo* = tegmento-valo). Sed mi konstatas, ke en la sudamerika uzado de tiu lingvo, la hispana, tre malmultaj profesiuloj uzas precizajn terminojn!“

Indas mencii la informon de **Bronislav Ĉupin**, ke li ne povas plenumadi la taskojn en KF, ĉar li nun malsanas, krome li suferas pro malboniĝanta vidkapablo. Ni deziru al li fruan resaniĝon!

Pri la ceteraj mankas al mi informoj, ekz. pri la freŝa pensiulo **Rémy Bouchet**, ankaŭ pri la koleginino **Ginta Uittenbogaard**, kies retadreso malakceptadas miajn liverojn de la KF-dokumento.

Vere ĝojiga estas la daŭra interesiĝo pri la temoj en KF flanke de mia franca amiko, leganto de KF, **Claude Longue Épée**. Preskaŭ regule li komentas niajn terminologiajn diskutojn.

Mi devas konfesi, ke mi neatendite renkontiĝis kun la leganto de KF el Vieno – **Uwe Stecher**, kiu la 21-an de majo 2011 partoprenis la solenadon de la 110-jara jubileo en la Esperantista Klubo en Brno.

Alia leganto de KF, **Jiří Patera**, eksprezidanto de EK en Prago, alte taksis nian agadon en la mesaĝo el la 8a de majo 2011. Mi citas: „Mi gratulas al vi kaj dankas pro la nova 28-a numero de Konstru-Forumo. Via Ko-Fo ĉiam tre ĝojigas min, ĉar ĝi montras, ke Esperanto ankoraŭ vivas... Mi komencis kompili ĉeĥa-esperantan konstru-vortareton laŭ la bildvortaroj Duden... Mi opinias, ke la konstrufaka terminaro, kiun vi kun viaj amikoj prilaboras, estas tre grava ne nur por fakuloj, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj kaj por aliaj fakoj, ekzemple ankaŭ por mia ekonomika terminaro. Tial mi ĉiam kun entuziasmo ricevos novan numeron.“

Al la leganto de KF, ĉeĥa geodeziisto **Karel Votoček**, mi dankas por lia prikomento de la temo 50.

La enkondukajn vortojn mi fermas per la urĝa alvoko: Ne preterlasu mian informon el la pasinta numero koncerne miaflankan ĉesigon pri la aperigado de la dokumento “Konstru-Forumo” fine de 2011. Mi tie skizis kelkajn eblajn manierojn de plua ekzisto. Krom **Fabien van Mook** neniu alia komentis la aferon, mi do petas vin, pripensu la aferon kaj sciigu al mi vian opinion, laŭeble ĝis la fino de aŭgusto 2011.

La starpunkto de Fabien koncerne Konstru-Forumon ekde januaro 2012: „La varianto **b** estus plej ideala. Sed mi aldonu unue, ke mi ne estos la transprenonto! Kaj due, ke mi verŝajne ne plu povos plene labori pri la esperanta konstruista terminologio; mia kunlaborado estos limigata ĉiuokaze. La klarigo estas jena: Jam de jaro mi spertas, ke mia profesia posteno postulas de mi pli da tempo kaj energio ol en la antaŭaj jaroj, dum kiuj ekzistadis KF. Mankas al mi la tempo por bone pripensi kaj pridiskuti niajn terminologiajn problemojn. Tio ĉi embarasas min. Mi krome konjektas, ke la tempomanko ne baldaŭ malpliigos. Bedaŭrinde. Se ni ne trovos kandidaton por la varianto **b**, mi pensas, ke la varianto **c** eblos. Cetere, espereble kune kun aliaj aŭtoroj ni ĉiuokaze sukcesos redakti kaj eldoni la Jarkolektojn de TAKE.“

Pardonpeto pro mistajpoj en KF 28 – (Bonvolu korekti ilin en via ekzemplero.)

- Paĝo 201, La temo 31, samlinie: stas → estas...
- Paĝo 201, konduktiv/o, samlinie: elektranaŭ → elektran aŭ...
- Paĝo 203, la 12a linio desupre: enkaŭ → ankaŭ...
- Paĝo 203, kablobalko, la lasta linio de la alineo: *Balken n* → *Balken m*;
- Paĝo 203, Nova temo 49, ties 4a linio: olta → alta...
- Paĝo 207, n-ro 85: r Schiefestein → r Schieferstein
- Paĝo 207, n-ro 98: e Firsthaue → e Firsthaube
- Paĝo 208, n-roj 90+91, ties 3a linio: impreginta → impregnita...

Daŭrigo de la „Kontribuo al la diskuto en TK de IFEF“ (KF 28, paĝo 200)

Nia okaza interveno estis logika, ĉar la konstruo de fervoja trako apartenas ankaŭ al nia konstrufaka terminaro. Al la artikolo en KF 28 reagis d-ro H. Hoffmann, lian mesaĝon (el 2011-05-26) mi ĉi tie prezentas mallongigite kaj postmetas miajn notojn (WE). Mi per tio praktikas nian terminologian ekzercadon.

H.Hn: Kvankam pluraj lingvoj enhavas la vorton „estakado“, ĝi ne troviĝas en nia DUDEN-vortaro. En franca-germana vortaro mi trovis: „estacade = Zaun; Mole“ (palisaro; moleo). Sekve mi tre dubas, ke la vorto estas sufiĉe internacie uzata por konkrete esprimi veturvojon sur pilieroj. En LIBEREC (rim. de WE: la ĉeĥia urbo, en kiu nun okazis la kongreso de IFEF) nia Terminara Sekcio decidis: „surpiliera veturvojo“.

WE: La mencio de *Zaun* en la franca-germana vortaro estas nepre erara, ĉar *Zaun* estas barilo, ankaŭ palisaro kiel barilo, neniukaze estakado – punta vorko por konduki veturvojon super la nivelo de tereno. Por mi la internacieco de „estakado“ estas sufiĉa.

H.Hn: Dum preskaŭ 4 jaroj mi profesie laboris pri projektado de trakoj. En la germana, certe ankaŭ en la ĉeĥa kaj aliaj lingvoj, vi tute pravas. Ni uzas la vorton „*Neigung*“ (klineco) kaj en transversa kaj en laŭlonga direkto, ĉar en la germana lingvo oni tute ne konas vorton „*Hangung*“ aŭ „*Hangigkeit*“ (dekliveco). En nia praktiko la esprimo „*Neigung eines Gleises*“ (klineco de trako) estas komprenata nur en laŭlonga direkto, sed „*Neigung einer Schiene*“ (klineco de relo) nur en transversa direkto. Alikaze necesas aldoni epiteton „*Quer-*“, (transversa) aŭ „*Längs-*“, (laŭlonga). Jes, ankaŭ en Esperanto ĝustas „laŭlonga klineco de relo“. Tamen, en Esperanto ekzistas la vorto „dekliveco“, kaj neniu malpermesas uzi ĝin kombine kun mezurunuo (ĉi kaze promilo). Ĝi estas eĉ pli klare komprenebla, se temas pri trafikvojoj (trako, ŝoseo ktp.). Pro tio jam miaj terminarfakaj antaŭuloj ĉiuloke decidis: „dekliveco“. En LIBEREC ni decidis laŭ via propono por 04255: „tordita trako“. **WE:** Malgraŭ mia prefero de klineco, la esprimo „dekliveco“ estas bone komprenebla kaj ĝusta.

H.Hn: En la ĉeĥa lingvo same kiel en la germana, la antaŭa meto de epitetoj estas DEVIGA, sekve kaze de vortinverso necesas la komo. En iuj aliaj lingvoj – ekzemple en la franca – oni metas epitetojn (ankaŭ devige?) malantaŭe. PAG diras nur pri KUTIMA antaŭa meto. Mi opinias, ke estas avantaĝo de internacia planlingvo, ne ordoni devigan vicordon. Tiukaze la komo en vortaroj estas superflua, eĉ ĝena. En la tuta fervoja terminaro ni dekomence rezignas pri tiu komo. Ankaŭ vi en via ĉi supra teksto metis adjektivojn malantaŭ substantivon: „faka vidpunkto leksikografia kaj poligrafia“, kaj sub 03527: „vorton internacian“. **WE:** Unue, mi ne konsentas pri via uzo de la adjektivo DEVIGA. En lingva sfero nenio estas deviga, la naciaj lingvaj institucioj, akademioj, ankaŭ la Akademio de Esperanto, ne ordonas, ne deklaras ion DEVIGA. Ĉiam temas pri rekomendoj kaj pri REGULAJ aŭ ORDINARAJ formoj. Antaŭmeto de epiteto en la lingvoj esperanta, germana, ĉeĥa k.a. prezentas stile regulajn formojn, dum en la franca estas regula la formo postmeta. EN PAG (paĝoj 362-363) estas dirite: ORDINARA VORTORDO... Epitetojn oni kutime metas antaŭe; sed oni povas loki ilin post la substantivo: **a)** por ilin akcenti (vd. § 274, 6); **b)** se du epitetoj estas ligitaj per **kaj**: *li estas homo malgrandanima kaj ege avara*. **c)** se ili havas suplementon: *vizaĝo plena de cikatroj; homo ŝatata de ĉiuj*. Sur la paĝo 365, punktgo 6: La epitetojn oni **akcentas** kutime per postmeto: *tio estas supozo absurda*... WE daŭrigas: La vortordon kutiman, ordinaran ni konsideru REGULAN, la kondiĉoj kaŭ-zantaj la postmeton de epiteto (PAG § 272, paĝo 363) estas ankaŭ REGULAJ, nome en propozicia sintakso. La atentigo, ke mi metis epiteton post substantivo, estas afero de stilo. do afero sintaksa, kiu ne rilatas al ordigo de vortaro, nek al ĝusta vortordo en termina vortogrupa. En tiuj ĉi kazoj la inversigo de regula vortordo devus esti montrita per komo, tiu aviza (atentiga) signo pri la faro estas pli-malpli necesa en alfabeto ordigitaj vortaroj.

Revizio de la betonterminaro – F. van Mook rekomendas aldonon de la terminoj kaj difinoj en la lingvoj antaŭtempe prizorgitaj de J. Halász (HU) kaj kompletigon de la nederlandaj terminoj. Indas pensi ankaŭ pri taŭga komputila formo, per kiu oni facile traktos ĉiujn tradukojn kaj ankaŭ la indeksojn. Aliaj rimarkigoj estas bonvenaj. Konkretan decidon ni faru fine de la jaro.

Jarkolekto de TAKE 2011 – La redaktoro Fabien van Mook informas: „La artikolojn de s-roj Grollemund, Hinšt, Obradović, Shen kaj Werner mi hvas. Per la KF 29 mi kore dankas ilin pro la akurata kaj ankaŭ frua sendo de ilia materialo! Mi ankoraŭ ne povis trakti kaj enpaŝigi la materialon. Ĝustatempe mi mem rekontaktos la aŭtorojn, se mi havos komentojn pri iliaj artikoloj. Kun propra artikolo mi mem verŝajne ne kontribuos; mi havas plurajn ideojn por artikolo, sed mi verŝajne ne havos tempon por verki.“

Terminologia Forumo en UK 2011 – Kopenhago

Unue notindas, ke UEA por terminologio nomumis novan komisiiton, nome s-inon **Mélanie Maradan** el Svislando, nuntempe ŝi agas en Berlino. Ŝi reprezentas UEA en Infoterm kaj en la normiga organizo ISO. En Kopenhaga kongreso nome de UEA kaj kunlabore kun E@I ŝi gvidos la Terminologian Forumon vendrede la 29an de julio 2011, ekde la 13a ĝis la 16a horo. Prelegantoj: Mélanie Maradan, Crister Kiselman, Amri Wandel, Eckhard Bick kaj Marek Blahuš. Pliajn informojn vi trovos ĉe: <http://esperanto.net/tec/terminologia-forumo-uk-2011.pdf>. - Kelkajn detalojn mi aldonos venonte.

Retrospekto: stuki → plasti → puci

Nur nun kaj hazarde mi trovis, ke F. Azorin en la jaro 1932 en sia arkitektura terminaro proponis la terminon „plasti“ por la nocio de ni nun esprimata per „puci“. Lia difino: „Kovri, ŝmiri malglatan supraĵon per mortero aŭ alia glueca, pasta substanco. Dikplasti = plasti per dika ŝmiraĵo, laŭ dika tavolo.“

Ĉe la Zamenhofa verbo „stuki“ Azorin notis: „Tegi muron, imitante marmoran supraĵon, per speciala ŝmiraĵo. Stuko = Miksaĵo, mortero, kies ŝmirpentro surmura imitas marmoron, ŝtonon. Gipsa stuko, kalka stuko.“ – Azorin same kiel ni konsciis, ke la ĝenerala aplikado de la terminoj enhavantaj la radikon stuk’ por tegado de masonitaj surfacoj per simpla mortero estas malĝusta kaj klopodis korekti la eraron de Zamenhof en la Universala Vortaro. Memkomprene, en la jaro 1932 li ne povis antaŭvidi la postan disvolvon de ĥemia industrio kaj de plasto. Nun lia propono „plasti“ ne konvenus. Tamen lia lanĉo de „plasti“ estas interesa kaj subtenas nian distingadon de stuki kaj puci.

Arĥitektura enciklopedio en Esperanto – ĉu okupiĝi pri la afero?

Mi ofte renkontas terminajn problemojn ankaŭ en la fako arĥitektura. Mi provis koncepte okupiĝi pri la terminoj komenciĝantaj per la litero „a“. Por tiu agado mi kompreneble uzas ankaŭ la terminaron de Francisco Azorin, sed estas necese tiun verkon el la jaro 1932 aktualigi. Se iu el la KF-anoj deziras la ideon subteni aŭ almenaŭ prijuĝi la specimenon (la liter-parton „a“), kiun mi eble finos ĉi-somere, aliĝu ĉe mi. (WE)

Ni solvas termin-vakaĵojn

La temo 31 – bazaj terminoj en konstrufaka varmteĥniko. En KF 28 mi kopiis la koncernajn „sliparajn“ difinojn de Rüdiger Eichholz. **Fabien van Mook** respondis jene: „La de vi trovitaj tekstoj de Eichholz estas interesaj, sed mi pensas, ke ili donas malmultan novon en la diskuto pri «konduktiveco» kaj «kondukteco». Tre koncize: mi daŭre ne konsentas pri via kompreno de grandoj, proprecoj, -ivo/-povo/kapablo k.s. ĉirilate. Miajn argumentojn mi jam skribis al vi plurfoje. Nur unu el la kvar fizikistoj esprimis sian opinion. Ili silentas jam dum duona ĝis unu jaro; pro mia tempomanko mi ankoraŭ ne aktive rekontaktis ilin...“ **WE:** La nekomunikemo de esperantistaj fakuloj (ĉi-kaze fizikistoj) estas bedaŭrinda afero. Por pli profunde analizi la problemon de „konduktivito kontraŭ kondukteco kaj inverse.“ ni ne havas fortojn. Mi fermas la temon 31 en la nuna stato. Fabien uzados la formojn kondukteco, rezisteco... mi kaj kelkaj aliaj KF-anoj uzados la formojn konduktivito kaj rezistivo. – En la pritema diskuto aperis ankoraŭ kelkaj aliaj malsame nomataj nocioj, sed nun ne ekzistas kondiĉoj por plena interkonsento, eble iam estonte, se en nia kolektivo aperos iu alia konstrufaka fizikisto, ni povos la temon remalfermi.

La temo 38 – traverso, longverso. Ni provu fermi la longe diskutatan temon pri la paro de balkoj (en certa situacio ŝpaloj) reciproke orientitaj al si orte. Imagu skeletan dom-strukturon kun trabaj tektoj. Traboj estas ortaj rilate al ĉeftraboj. En la grundplano la ĉeftraboj estas orientitaj transverse kaj transprenas ŝarĝon de la traboj. La ĉeftrabojn ni povas nomi „transversaj traboj“ (el statika vidpunkto „transversaj balkoj“), la traboj (balkoj) estas orientitaj laŭlonge de la strukturo. Simile ni povas trakti skafaldon (EBV Duden 271/26, 27) kaj ankaŭ pontan ferdekon. En la diskuto aperis por la nocio „transversa balko“ ankaŭ „kverbalko“ kaj „traverso“, ambaŭ logikaj kaj ĝustaj. Por la „laŭlonga balko“ aperis „longbalko“ kaj „longverso“ kaj en la kontribuo de F. van Mook (iel nelogike kaj neutile) la prefiksita fremdaj radikoj len+, leng+, long+, lung+ apud la transversa ĝusta formo „kverbalko“. B. Ĉupin pledis por traverso kaj longverso. Đ. Obradović pledis por kverbalko kaj longbalko. K. Votoček rekomendis traverson. La diskuton vi povas relegi precipe en KF 24, p. 157-158 kaj KF 26, p. 179. Mia provo pri la fermo:

Mi pledas por la INTERENACIA vorto TRAVERSO (ĝi ja troviĝas en 8 esperantaj vortaroj!) kaj aperas preskaŭ en ĉiuj eŭropaj lingvoj. Nun mi rigardas en la Grandan vortaron germana-esperantan (eld. en 2007) de E. D. Krause, p. 1405: **Traverse f a** *Arch (Querbalken, Querträger) transversa trabo, Fachspr auch kvertrabo*. La tradukoj estas ĝustaj, tamen mi konstatas, ke la lerta kaj kuraĝa leksikografo kaj lingvisto ne kuraĝis enkonduki esperantan „traverson“. Al lingvaj fakuloj estas konate, ke la prefikse uzata „trans+“ havas la saman signifon ankaŭ kiel mallongigita „tra+“. Pri tio oni povas konvinkiĝi en la verko de F. Cl. Werner¹. La latina prefikso „tra+“ en la senco „trans+“ estas trovebla en latinaj vortoj, jen: *trā-dūcō, trā-iciō, trā-iectiō*... La esperanta adjektivo „transversa“ estas parenca kun la internacia formo „traversa“ (kun ioma diferenco en Esperanto: direkti sin **tra**, ne **trans**). La derivado de „traversa“ al substantivo estas facila kaj ĝusta: **traverso**. Dum en PIV „transverso“ estas difinita (2 signifoj), traverson ni devas difini pere de naciaj lingvoj (eble) jene: Transversa balko (trabo), kies akso situas transverse al la laŭlonga akso de konstrukto (dom-strukturo, ponto, skafaldo k.s.); ĉe laŭlongaj portaj sistemoj traversonj transigas ŝarĝon al la laŭlongaj balkoj – ni nomu ilin ĉefbalkoj, longbalkoj, nove ankaŭ „longversoj“, en certaj kazoj „longŝpaloj“.

La para nocio al traverso estas **longverso**. Esperantisto, kiu plu rezistas kontraŭ la novaj formoj, povas uzi la tradiciajn: transversa trabo/balko kaj laŭlonga trabo/balko; kverbalko kaj longbalko. Mi esperas, ke la solvo kontentigas ĉiujn. Mian argumentadon tamen estas utile kompletigi per **vortofara** lecioneto:

Estas necese respondi, ĉu „travers“ kaj „longvers“ estas vortradikoj. – Kio estas morfemo?

En ĝenerala lingvoscienco MORFEMO estas la plej malgranda grupigo de fonemoj, kiu entenas la bazan leksikan signifon. Morfemo povas esti vortofara, formofara, event. portanto de funkcio, krome konektemo (kunliga «o» en kunmetaĵoj, pro pli bona prononceblo, ekz. en la vorto: vort(o)fara.

Vortofaraj morfemoj estas radikoj kaj afiksoj (prefiksoj, sufiksoj, infiksoj, interfiksoj, postfiksoj, cirkumfiksoj – en Esperanto ekzistas nur la unuaj du specoj). Formofaraj morfemoj, kiuj estas kutime fine de vorto, estas nomataj ankaŭ kiel gramatikaj finaĵoj. La subfako pri morfemoj nomiĝas MORFEMIKO.

En PIV pri morfemo estas menciite: morfemo – minimuma senco- aŭ funkci-hava lingva unuo; sinonimoj: monemo, vortelemento. (La difino kongruas kun la ĝenerala lingvoscienco.)

Tamen esperantistoj ĝenerale ne agnoskas la internaciajn (ofte sciencajn, teĥnikajn) afiksojn kiel apartajn morfemojn (vortelementojn) kaj per tiu neracia sinteno strange apartiĝas de la monda scienco.

Rim. de WE: Antaŭ jaroj mi rete diskutis kun la membroj de la akademio *Sekcio pri faka lingvo* kaj estis surprizita per primitiva fundamentismo de la pliparto de la membroj. Mi rememoras, ke ni traktis la vorton „kilogramo“. La akademianoj tiam asertis, ke „kilogram“ devas esti radikoj, do ne plu dividebla radika morfemo. Ili naive rezonis per la dubinda fakto, ke la unuan radikparton „kilo“ oni ne povas uzi kiel memstaran vorton (surbaze de la Fundamento de Eo). Ĉiu iom klera homo scias, ke la obligaj kaj onigaj prefiksoj en la sistemo SI, deciditaj kaj normigitaj en la interŝtata **Internacia konferenco de pezaj kaj mezuroj** (kilo, mega, giga, tera; mili, mikro, nano, piko, femto, atto) estas aplikataj kiel **prefiksoj** en ĉiuj kulturaj nacioj kaj ties lingvoj. Kaj jen, esperantistoj, kiuj deklaras sian lingvo INTERNACIA, konsideras la internaciajn prefiksojn parto de la apuda radikoj, tiam temis konkrete pri „kilogram“, laŭ mia firma konvinko „kilo/gram“. Tio atestas pri nesufiĉa mensa dispozicio de certaj esperantistoj „akademianoj“! En Konstru-Forumo ni traktu la aferon konforme al la lingvoscienco.

La „vortostumpojn“ (sen gram. finaĵo) „tra/vers“, „long/vers“, samrilate ankaŭ „trans/vers“, ni konsideru kiel stamojn² (radikalojn) – konforme al la germana verko de Fritz Cl. Werner.

Ĉar ne malgranda parto de esperantistoj neglektas la 15an regulon de la fundamenta gramatiko (Zamenhof: La tiel nomataj vortoj **fremdaj**, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo), mi proponas la solvon: Por ne perforti la grupon de samideanoj, kiuj rezistas la konsideron, ke internaciaj (fremdaj) afiksoj estas samtempe regulaj afiksoj esperantaj, ni en nia konscio traktu la aferon kompromise: Se en stamo (radikalo) estas apud la internacia afikso radikoj esperanta (ekz. kilo/gramo), aŭ neesperanta, ekzemple latina (tra/verso), sed nocie travebla, estu tolerata la traktado de tiu dumorfema esprimo kiel „radiko“, pli bone dirite kiel „pseŭdoradiko“. La saman situacion prezentas leksika kuniĝo de radikoj esperanta kaj radikoj fremda, ekz. latina, kiel okazas en nia „long/vers“. Kiu ne volas ĝin vidi dumorfema kunmetaĵo, tiu ĝin konsideru kiel novan kompaktan „radikon“, kvazaŭ novan neologismon. Laŭ mia opinio, tiu ĉi skismo praktike ne tuŝos la vortofaradon en Esperanto.

¹ **Fritz Cl. Werner:** *Wortelemente lateinisch-griechischer Fachausdrücke...*, eld. VEB Max Niemeyer Verlag Halle, 1967, p. 76: trans+, nur selten zu tra- verkürzt (Tra+ jekt)... in den Bedeutungen „hindurch, über...“

² **stamo** kaj la sinonima **radikalo**: Parto de vorto sen gram. finaĵo, konsistanta el radikoj(j) kaj afikso(j). Ĝuste tiu ĉi nocio devus anstataŭi la nomon „radiko“ kaze de: tra/verso, long/verso, trans/versa, kilo/gramo ktp.

La temo 41 – Segitaj lignopecoj. J. Horváth: „Laŭ mi estigus pli grandan haoson, se oni enkondukus, plian terminon, ekzemple ‚dosko‘ aŭ ‚planĉo‘. Ni restu ĉe ‚breto‘“. **WE:** La kolego Horváth komprenas la aferon same kiel mi. Tamen tiun ĉi solvon ne akceptas **F. van Mook**. Jen lia lasta starpunkto: „Mi plu forte kontraŭas la uzon de «breto» anstataŭ PIV 2: tabulo. Al mi ne tro gravas, ĉu oni enkondukos «planĉon», «planŝon», «doskon» aŭ «deskon». Mi preferas la formon «planĉo», pro la simileco al ties origina pikardia³ formo «planke» («k» kaj «ĉ» etimologie pli "rektas" unu al la alia ol «k» kaj «ŝ»). La vorto aperas almenaŭ en la franca (planche), nederlanda (plank), angla (plank) kaj sveda (planka -- Moberg tradukas ĝin al la esperanta «dilo»). **WE:** La disharmonion mi tre bedaŭras, ĉar la nuna situacio de la substantivo „tabulo“ estas netenebla (30 signifoj!, pluraj rekte en konstrufako! Por la lingvo, kiu estas deklarata kiel internacia kaj plana, tio estas hontinda makulo). Mi ne insistas pri «breto», mi insistas pri konvena radikvorta nomo, povas esti ankaŭ «planĉo». Sed pri unu tia nomo ni interkonsentu ĉiuj. Sen la ĉies interkonsento mi devos fermi la temon senrezulte. Mi ankoraŭ aldonas, ke la rekomendo de K. J. Moberk (Malmö 1958), ke por dilo kaj tabulo (breto, planĉo) estu unu nomo «dilo», estas por mi kaj por niafaka kaj lignoindustria fakoj absolute neakceptebla. La fermon mi prokrastas ĝis la venonta KF-numero, bonvolu reagi ĉiuj, unuavice por la propono de Fabien: planĉo; duavice, se tiun version vi malakceptas, proponu vian solvon.

La temo 43 – EBV Duden 274. J. Horváth: En la nocio 23 temas ne pri tegmento, sed lukarno. **WE:** Prave, en KF 28 korektu (paĝo 201 sube) bovokula tegmento al **bovokula lukarno**.

La temo 44 – Mönch-Nonne Dach. J. Horváth: trovas la terminojn: imbrica kovraĵo, imbrico, kaliptero bonaj. La ceteraj povas esprimi sin kadre de la temo 50 – EBV Duden 275 – tegmentoj.

La temo 45 – Balkosubtenaj konstruktoj. J. Horváth: Pri ŝtrebobalko kaj kablobalko li konsentas, sed la proponon **pendoboko** li prikomentis jene: „Unue oni devus difini la nocion ‚boko‘, kiu estas tute ŝveba, svaga io. La germana uzas ankaŭ la vorton ‚Hängewerk‘. Ĉu ĝi ne estas iaspeca truso kun pendiga fosto? **WE:** Jes, se ni akceptus la version kun „boko“, ni devus difini ĝin. La konstrukto estas vere iaspeca truso, sed mi ne rekomendas uzi la terminon truso, ĉar ĝi estas tro ĝenerala, esprimanta la koncernan statikan sistemon, ne ties formon (enton). Male la angla *truss* esprimas la formon – bindoron laŭ la temo 48 (eble do: pendobindoro?). Ĉu laŭ la germana „pendovorko“, ĉu laŭ la pola „pendolevilo“. Sistema nomo, simetria al la du ceteraj „balkosubtenoj“ (ŝtrebobalko, kablobalko), estus: **pendobalko**, por mi akceptebla. Mi petas pri la nova prikonsidero kaj event pri via ĉi tema propono.“ – La reago de **F. van Mook:** „Mi demandas, ĉu «pendoboko» estas sufiĉe trafa. Kial ne «bokobalko»? Mi preferus nomon finiĝantan kun «-balko», same por la aliaj du nocioj. Ĉu kablobalko enhavas nur kablonojn? Anstataŭe mi ankaŭ imagas stangon. Ĉu stangobalko? Ĉu ni ne povas elpensi esperantan esprimon, kiu pli proksimas al «*unterspannter Balken*»? «Substreĉa balko»? **WE:** Jes, mi pledas por la simetria **pendobalko** kaj esperas, ke ĝi estas por ĉiuj akceptebla. Al Fabien mi respondas: Ĉe la kablobalko la kablo ne povas esti ŝanĝita al stango. Kablo ja ebligas modifi la streĉon kaj tiel la sublevan forton koncerne la balkon kaj la fleksokurbiĝon (sagon) de la balko. „Substreĉaj balkoj“ estas ĉiuj tri sistemaj specoj, ne estas do eble tiun ĉi priskriban nomon atribui nur al la „kablobalko“ (apud la germana nomo *unterspannter Balken*, ekzistas ankaŭ la sinonima *Stemmbalken*). Mi konsideras, ke ni komune konsentas pri: pendobalko, ŝtrebobalko, kablobalko. Se iu havas alian koncepton, informu min.

La temo 46 – specoj de balko kaj distanco inter la subteniloj – kampo. J. Horváth senkomente konsentas kun la proponoj. **F. van Mook** sciigis: „Kun «simpla balko» kaj «kontinua balko» mi konsentas. Kial ne «span(spac)o» anstataŭ la de vi proponita «kampo»? **WE:** La sola „spano“ ne konvenas pro sia abstrakteco (mezuro en metroj), „spanspaco“ povus esti, sed kial eviti la internacian konvencion pri „kampo“? Esperanto kiel internacia lingvo devas maksimume sekvi internacian karakteron de nomoj. Se uzatas *field, Feld, champ, pole...* laŭ mia opinio estas inde la nomon sekvi. Sian rolon ludas ankaŭ la praktika vidpunkto, pli eleganta estas la eldiro „trikampa ponto“ ol „trispanspaca ponto“. Mi aldonas, ke la dua maniero estas komprenebla kaj ankaŭ senproteste uzebla, sed preferata estu la unua maniero. Ĉu la solvo akcepteblas?

La temo 47 – Oberlicht, rooflight. J. Horváth: „Por mi ‚suprolumo‘ estus konvencie akceptebla, kvankam fakte ĝi ne estas lumo, sed lumilo. PIV proponas ‚luko‘: „1 Aperturo ordinare vitrita aŭ kradita, en tegmento, plafono aŭ kelo, por enlasi lumon: mansarda luko. SIN. lumluko.“ Eble lumluko konvenus, ĉar luko servas ankaŭ por aerumo.“ **WE:** La germana kaj angla terminoj entenas ja ‚lumon‘ (*Licht, light*), kial do en Eo ne povus metafore aŭ metonimie esti la verba substantivo „lumo“, analogie al: premo, tiro, tordo, tondo, kiuj origine estas agoj, krome meĥanikaj grandoj kaj ankaŭ konkretaj valoroj esprimantaj konkretan

³ **pikardia** rilatas al Pikardio, la regiono en norda Francio (la ĉefurbo Amiens), en pratempo loĝata de keltaj belgoj, ekde la 1a jarcento parto de la romia Gallio, en la 5a jarcento akirita de frankoj, en la 12a jarcento konkerita de angloj, ekde la 16a jarcento Pikardio kiel franca administra departemento kun preskaŭ 2 milionoj da loĝantoj. Supozeble ekzistas la lingvo de la originaj keltaj loĝantoj – la pikardia lingvo (laŭ la supozo de WE).

streĉon. „Luko“ kiel ĉefelemento de la kunmetaĵo „lumluko“ miaopinie **ne** konvenas, ĉar luko ĉiam estas nur negranda aperturo, vitrita, kradita, ankaŭ kovrita per masiva kovrilo, ekz. la strata, trotuara, ferdeka lukoj. Sed nia nocio de **vitrita tegmento** aŭ ĝia parto, pli ofte ĝi estas grandarea, ĝi havas nenion komunan kun luko. Nia nocio vere estas **lumtegmento**, tamen mi ne rekomendas ĝin pro praktikaj konfuzigaj konsekvencoj. Povas aperi bezono esprimi: „**Tegmento** kun polikarbonata **lumtegmento**.“ La ripeto de la vorto tegmento estas por mi ĝena. „Suprolumo“ estas la formo ebla, sed ne ideala. Ni la problemon pripensadu plu! La reago de **Fabien van Mook** estas jena: „Laŭ mi tute ne konvenas «lumo» en tiu ĉi kazo; mi ne konsentas pri «lumsupro» nek «lumtegmento». Se temas pri fenestro, oni nomu ĝin laŭ tio: «benda tegmenta fenestro» en la kazo de la bildvortaro 274/21.“ **WE: Oberlicht, rooflight** nepre ne estas fenestro, nek tegmenta fenestro. Principe fenestro estas **aperturo** (fenestra kaj porda aperturoj, ankaŭ ĉe la tegmentaj fenestroj!), kiu servas kiel „ekipaĵo“ ebliganta la internon prilumi kaj aerumi. La aperturo estas supre finita per lintelo, sube per horizontala parapeto, ambaŭflanke per embrazuroj. **Oberlicht, rooflight** havas tute alian karakteron kaj konstruicajn solvon, la nomo „fenestro“ ne taŭgas. Nove mi proponas kombinon de la latina (prefiksebla) prepozicio super: *super* aŭ *suprā (terram)* kaj de la esperanta substantivo „lumo“, spite onian rifuzon de tiu solvo. Konsciu (kaj rigardu PIV), ke „lumo“ jam uzatas kiel lumilo: PIV 3 kaj 4, ĉe aŭtomobilo „postlumoj“ kaj „blinkolumoj“, plu „haltlumo“, „nordlumo“, „plafonlumo“, „planklumoj“, „reklamlumoj“, „trafiklumoj“. **Superlumo** do povus konvencie akiri la deziratan signifon de lum(il)o lokita **super** la surplanka okazado en fabrika halo aŭ en ateliero, ekspoziciejo. Aŭ ni plu serĉu en nacilingvoj, trovebla estas la itala *lucernario* aŭ la rusa *fonar’* (fonaro). La ĉeĥa estas formita el la radiko „*světl*“ (lum) kaj la sufikso „*ik*“ (analogia al la internacia „al“) en Esperanto tiel estiĝus „lumalo“. Mi atendas vian novan prikonsideron de la temo!

La temo 48 – bindoro. **F. Horváth** ne kontraŭstaras, **F. van Mook** konsentas. Ĉu jam akceptita?

La temo 49 – castellated beam → **krenela balko.** **F. Horváth** ne kontraŭstaras. **F. van Mook** informis, ke tiu nomo „povas esti“. Kaj li aldonis: „En la nederlanda oni referencas al la formo de la truoj de la pretigita balko: «*honingraatligger*» (laŭvorte «mielĉelara balko»). Tio ĉi povus esti inspiro por esperanta termino, kvankam mi ne konas mallongan vorton anstataŭ «mielĉelaro».“ **WE:** Ĉar neniu rifuzis la proponon, mi fermas la diskuton kaj la terminon „krenela balko“ konsideras kiel akceptitan.

La temo 50 – EBV Duden 275. **F. van Mook** rezignis pri la juĝo pro tempomanko. **J. Horváth** oponas la proponojn de J. Werner sub la n-roj: 14, 18, 24, 71 kaj 99, pri la ceteraj li sin esprimis: „Pri ĉio cetera mi konsentas aŭ ne oponas aŭ ne havas opinion.“

N-ro 14: Bordero ĉirkaŭas randon, pro tio mi preferas ‚kolumo‘, kiu space ĉirkaŭas. **WE:** Borderi signifas garni la randon de io ebena, ne spaca. En la broŝuro *Ladistaj produktoj en konstruado* (por tubo vidu fig. 100) mi aplikis la substantivon ‚bordero‘ por: bordero de muroj, supermasonaĵoj, masonitaj kamen- laj ventol-tuboj, tuboj, fostoj kaj stangoj. En ĉiuj kazoj temas pri bordera ligo de la nomitaj objektoj kun la tegmenta kovraĵo tiel, ke pluvakvo ne penetru en la tegmentan konstrukton. Bordero do sekure garnas (borderas) la junton (liman lokon) inter la objekto kaj tegmenta kovraĵo. La termino „bordero“ estas pli ol „kolumo“, ekzemple ĉe la trapaso de tubo tra dura tegmenta kovraĵo la bordero“ konsustas el: baza lado, manŝeto (kolumo), dilata ĉapeto, ŝtopa mastiko, lada zono kaj ŝraŭboj.

N-ro 18: Ne la ilo estas karakterizata per distanco, sed la latoj. La ilo distanciĝas, ne distancas. Do laŭ mi: ‚latdistanciĝilo‘. **WE:** La eldiro de J.H. estas neprava, ĉar „la ilo estas karakterizata per distanco de latoj (latdistanco)“, la nura „distanco“ en ĉi kunteksto estus svaga, neniondira. Estas necese vidi la terminon trielementa, la ĉefelemento estas ilo kaj la duelementa flankelemento (latdistanco) determinas la ilon. Pri la temo vidu PAG § 301. – Ne estas vero, ke „la ilo distanciĝas“, sed „per la ilo oni fiksas difinitan latdistancon“ simile, kiel (vidu PIV sub labor/i) „laborilo estas ilo, per kiu oni faras difinitan laboron“. Netransitivaj verboj kun la sufiksoido -il/ ne bezonas la faktitivan formon kun -ig/. Komparu ankoraŭ ilojn derivitajn de netransitivaj verboj: aliĝilo, flugilo, glitilo, ludilo, lumilo, pendilo, pezilo, sidilo, veturilo k.a. Aliĝilo ne aliĝas, sed servas por aliĝi... simile distancilo ne distancas, sed servas por distanci (la latoj distancas).

N-ro 24: ‚Laboraperturo‘ sufiĉas, ĝi ja servas por laboraj celoj (eliri, transdoni materialon, ilojn ktp. **WE:** Jes, sufiĉas, mi konsentas kun tiu formo.

N-ro 71: ‚Ardeza tegmentisto‘ sonas por mi konfuze ridige, la unua senco de ‚ardeza‘ ja estas io konsistanta el ardezo. **WE:** Ardeza tegmentisto por sufiĉa lingvoscianto ne estas konfuze ridiga, ĉar laŭ PAG § 286: „Ĉe la substantivaj radikoj la a-finaĵo povas havi tri specojn de determino: 1. **identecon** (*reĝa persono*), 2. **kvaliton** (*reĝa sinteno*) kaj 3. **rilaton aŭ apartenecon** (*reĝa palaco*). Neniu el la determinoj estas primara, ili estas egalrajtaj. Ardeza tegmentisto estas specialigita por ardreza kovraĵo de tegmentoj, lia

pozicio al ardezo estas rilata, ne kvalita, tio ja devus esti por ĉiu klara, tute ne ridiga. La formo „ardez-tegmentisto“ estas ankaŭ ĝusta, sed kiel longa trielementa kunmetaĵo malpli oportuna.

N-ro 99: ‚Überdeckung‘ – unu elemento SURkovras (ne superkovras, ili ja tuŝas unu la alian) la alian, do ‚surkovro‘ aŭ ‚surkovraĵo‘. WE: La germana prepozicio ‚über‘ en la senco loka (*Ort: wo?*) laŭ E. D. Krause estas super; (*oberhalb*) supre de. Mi konjektas, ke en la germana fonto ne estas uzita ‚auf‘ (sur), ĉar ĝi tendencas esprimi staton, dum ‚über‘ permesas kompreni la agon : supermeto. La esprimon supermeto mi nun vidas pli konvena kompare kun superkovro, pro la senco de movo en meti. Memkomprene, ankaŭ surkovro, surmeto estas ĝusta, sed neakcepteblaj estas por mi la versioj ‚junt-kovraĵo‘ kaj ‚interkovra junto‘, kiuj ne esprimas la ‚agon kun rezulto‘: kovro aŭ meto. La mencio pri ‚tuŝo‘ de la elementoj ne estas defendebla, ĉe ‚super‘ ne estas dirite, ke la elementoj ne tuŝas sin, ke ne kuŝas unu sur (super) la alia.

K. Votoček plej ofte konsentis kun miaj proponoj, escepte de: **11+82 – K.V.**: Prefere tegment-valo, ĝi estas pli klara ol simpla ‚valo‘. WE: Jes, sed se la nomo aperas en terminaro pri tegmentoj aŭ en artikolo pri tegmentoj, sufiĉas uzi la netan terminon ‚valo‘. **14** – Prefere kolumo el zink-lado. WE: Eksplikita supre ĉe J. Horváth. Zink-lado kaj zinka lado estas sence identaj, tamen mi rekomendas limigi uzadon de kunmetaĵoj. **56 – K.V.**: Konveks-konkava tegaĵo ŝajnas al mi bone komprenebla kaj ne necesus enkonduki neologismojn imbrico kaj kaliptero. WE: Unue, ne tegaĵo, sed kovraĵo. Due, priskribaj nomoj estas longaj kaj ĝenerale nesufiĉe nocio-portaj, nesufiĉe difinaj. La naciaj lingvoj la koncernan tegolon nomas vere specife: (en) *imbrex, flap pantile*, (de) *Mönch(ziegel)*, (fr) *tuile canal, tuile romaine*, (pl) *dachówka rowkowana*, (ru) *желобчатая черепица*, (cs) *prejz*. Grava motivo por elekti la nomon ‚imbrico‘ estis la latina *imbrex*, kiu devenas el tempo, kiam tiu ĉu speco de ceramika kovraĵo aperis, krome ĝi uzatas en la angla lingvo. Kaj ankoraŭ unu motivo: Konveks-konkava kovraĵo estas ankaŭ ‚S-tegoloj‘, ĉefe nomataj *esovky*. La ceteraj rimarkigoj rilatas precipe al kompletigo de la determinaj flankelementoj. En la terminaro pri tegmentoj ja ne estas necese ĉiam apud ĉiu objekto ripeti la atributon, kiel ekzemple ĉe la n-roj **84** (*Schieferschere*), **86** (*Rücken*), **87** (*Kopf*), **88** (*Brust*): Ardez-. La germana originalo ja ne enhavas la atributon. La n-ro **24** mi jam respondis al J. Horváth, jes, la labor(-)apertruro ĝustas. Ankoraŭ mi prezentas noton pri atributoj:

En mia ‚*Terminologia kurso*‘ (1986) sur la paĝo 53 mi priskribis tri formojn de atributo: (1) prepozitiva formo, (2) adjektivepiteta formo kaj (3) formo de kunmetaĵo. Mi rekomendas studi tion, ĉar estas utile konsciencie elektadi la formon. K. Votoček trouzas la formon kunmetan, kiu laŭ mia konvinko estas malplej preciza. Kiu el vi ne posedas la kurson, vi povas ĝin mendi en la Libroservo de UEA, en Ĉeĥio mi povas ĝin sendi kontraŭ pago de 10 Kč plus afranko 18 Kč.

La noto de WE: Mia iniciatemo iom suferis pro nekomento de la temo 50 flanke de nia **tegmentisto** P.G. Mi esperas, ke li trovos tempon kaj emon por levi siajn rimarkigojn antaŭ la fino de aŭgusto.

La temo 51 – ŝtonceramiko. J. Horváth kaj K. Votoček ne kontraŭstaras. F. van Mook informis min: ‚Mi ne rekomendas «ŝtonceramikon», sed mi preferas enkonduki novan radikon, eble «grezo», «kamenino» aŭ alian. La nomon «ŝtonceramiko» mi konsideras ne sufiĉe trafa. Mi scias, ke multaj diversaj lingvoj uzas «ŝton-» jam ekde la mezepoko, kaj mi supozas, ke oni elektis tiun vorteton pro tio, ke la materialo estis plej dura kaj nepenetra materialo, kiun oni siatempe povis produkti ("dura kiel ŝtono"). Se mi bone memoras, vi iam diris, ke ŝtonceramiko estas farita el muelita ŝtono, sed tiu ĉi procezo estas relative nova; antaŭe oni serĉis kaj uzis la ĝustajn argilojn ktp. (ekzemple en Westerwald en Germanio). – WE: Krudmaterialoj: ceramikaj argiloj alĝustigitaj per almikso de magrigaĵoj kaj fluksoj (fandigaĵoj), ekz. de spato, muelitaj rokaĵoj, bazalto, fonolito. Ŝtonceramiko produktiĝis nur en tempo, kiam la muela teĥniko de rokaĵoj ekzistis. Proponi ‚grezon‘ ne diferencas de la PIV-propono de ‚grejso‘, ambaŭ devenas de la franca konfuziga nomo *grès*. Ĉar en tiu materialo grave partoprenas ŝton-substancoj kaj tiu fakto reflektiĝas en multaj eŭropaj terminoj, la nomo ŝtonceramiko estas tre taŭga nomindiko por tiu speco de ceramika materialo – ceramiko karakterizata de ŝtono.

Nova temo 52 – Tektoniko (en arĥitekturo). Arĥitektura teorio kaj praktiko pritraktas kaj prijuĝas domkonstruajn konstruktojn laŭ du vidpunktoj: statika kaj artisma en reciproka ‚simbiozo‘. Tektonika estas tiu konstruaĵo, kies arĥitekturaj elementoj esprimas statikan funkcion, por kiu ili estas determinitaj. Tektonika verko estas perceptebla (videbla) konsistigita el elementoj portantaj kaj portataj (portaj kaj konstrue suplementaj). Kiel modelo de **tektonika arĥitekturo** estas konsiderata arĥitekturo de malnova Grekio. Tie krom la alvida diferencigo de portaj elementoj (kolono, muro) kaj portataj elementoj (trabo, entablemento, kornico, tekto) aperis vico da formoj indikataj kiel ‚modluroj‘. **Rim.:** La unua signifo de tiu termino estas geotektonika: tektonika geologio, kiu okupiĝas pri strukturo de terkrusto kaj pri ties deformiĝoj (vidu PIV).

Postskribo al la 29a numero

Antaŭ ni estas feriaj monatoj, sed la apera ritmo de KF procedas sen paŭzo. Mi ne sumigas la taskojn, kiel mi tion faris pasintfoje, trovu mem la taskojn, kiujn vi pretas kaj kapablas studi kaj komenti. La rezultojn sendu al mi ĝis la **31a de aŭgusto 2011**.

Ne forgesu reagi al mia anonco pri ekŝiĝo el la kunordiga kaj pretiga funkcio de „konstru-Forumo“, kiel mi tion priskribis enkonduke al la 28a numero.

Pro la nun neokupita para paĝo 216 en KF 29, mi enmetos la bildkomplekson 276 (plankoj, tektoj, ŝtuparoj) el EBV Duden anticipe por la diskuta temo en la septembra numero. Observu kaj pripensu ĝin.

Brno la 14an de julio 2011

Jan Werner

